Johann Wolfgang von Goethe,

Ergo bibamus!

tradukita de Ludwig Emil Meier

1. Jen ni kunvenintaj kun laŭdinda vol',
Pro tio nun: ergo bibamus!
Tintadas la glasoj, silentas parol',
Pripensu do: ergo bibamus!
Malnova ĝi estas kaj fortika dir',
Ĝi taŭgas por iu ajn plenkreska vir',
Kaj sonas eĥoe laŭ kora dezir',
Kunuloj do: ergo bibamus!

2. La sorto forvokas min el via rond',
Kunuloj, ho! Ergo bibamus!
Foriras mi sen granda havo al mond',
duoble do: ergo bibamus!
Ĉu avaregula amasas envi',
Do gajan junulon zorgigas neni',
ĉar unu l'alian ja helpas el ni:
Atestu per: ergo bibamus!

3. Pri la hodiaŭo, ĉu decas parol'?
Mi pensas nur: ergo bibamus!
Ŝanĝiĝo ja estas de l'mondo la rol',
Pro tio ja: ergo bibamus!
Eliras kunulo el urba pordeg',
La nuboj foriĝas pro suna la reg',
Jen ĝi la emblemo de nia ĝojeg',
Finkantu nun: ergo bibamus!

Traduko de la Germana poemo "Ergo bibamus!" de Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Ludwig Emil Meier *(∗1847-02-16 – †1919) en 1907.*

Arg-85-170 (2003-11-10 08:49:29)

La latinaj vortoj "Ergo bibamus!" signifas: "Pro tio ni trinku!"
Tiu ĉi traduko troviĝas en la kantlibro "Esperantista Kantaro", kiu enhavas tradukojn de germanaj kantoj. La tradukoj estas faritaj de Ludwig Emil Meier. La libro estas eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann (Steglitzer Str. 44, Berlin, Germanio).